The Association thanks you sincerely for your support during 1950, and requests that you send your 1951 dues soon. The membership rates (unchanged) are set out below, and an early remittance would be very helpful and would avoid the extra office work of sending out reminders.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and the *Informilo*. Your EANA membership automatically gives you “Associate Membership” (AM) in the UEA. You receive the coupons of the UEA and have a right to the services of Delegates throughout the world.

In addition, there are “Individual Membership” categories in UEA: the *Yearbook* is supplied for an additional \$1 annually; the *Yearbook* and *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$2.50 annually. Here are Membership Rates for 1951:

EANA membership including UEA	Associate of UEA	Yearbook of UEA	Yearbook & Esperanto
Subscribing member	\$3.00	\$4.00	\$5.50
Sustaining member	5.00	6.00	7.50
Patron member	10.00	11.00	12.50

MEMORINDA KONGRESO — PARIZO 1950

DORIS TAPPAN CONNOR

S-ino Connor komentas pri siaj impresoj kiel reprezentanto de Nord-Ameriko en la Universala Kongreso, 1950, kiun ŝi ĉeestis kun la edzo, *G. Alan Connor*, komitatano de UEA.

La ĉefa konstruaĵo de la fama universitato "Sorbonne" sidas solide, majeste, en la studenta kvartalo "Montparnasse" de Parizo. Kiam mi unue vidis ĝin, unu semajnon antaŭ la malfermo de la Universala Kongreso de Esperanto, ĝi aspektis kiel kvieta, giganta, ŝtona senvivaĵo. Sep tagojn poste, je la 5-a de Aŭgusto, 1950, tago de la oficiala enregistrado de Esperantistoj por la Kongreso, okazis tuta transformiĝo. Jen — ĝi estas abelujo en kiu svarmas nove-alvenintaj verdaj abeloj. Zum-zum ekoas la voĉoj, bzz-bzz aŭdiĝas la laborabeloj — tiuj senlacaĵaj membroj de la Loka Kongresa Komitato, dum ili prizorgas pri afiŝoj, tabloj, enregistrado, informtabulo kaj tiel plu. La verda standardo de Esperanto flirtas super la pordo. Ekstere staras du tri grandaj, luksaj, bluaj kaj flavaj aŭtobusoj de Svedlando, kiuj alportis pli ol 300 svedojn al Parizo. Oni komencas vidi belajn kostumojn de diversaj landoj. Subite komencas vivi la Esperantigita Sorbonne!

Ni, kiel laborabeloj de Ameriko, provizis nin je tablo kun afiŝo "Nord-Ameriko". Proksime al la pordo en bona situacio, ni sidis por saluti samideanojn kaj por montri la "mielon" de la nord-amerika movado: la gazeton AE, la Esperanto-diskojn de la nova koresponda kurso, la broŝuron de la Nacia Eduka Asocio, ktp. En tiu porda loko ni baldaŭ fariĝis ĝenerala informejo por ĉiu vaganto: usonaj studentoj kiuj deziris informiĝi pri kio okazas, "kiaj personoj estas ĉi tiuj?", "kian lingvon ili parolas?", kaj ĵurnalistoj kiuj serĉis intervjuojn kun " eminentuloj", ktp.

Dimanĉe matene okazis la solena malfermo de la Kongreso. La granda amfiteatro estis plena je personoj — pli ol

2000 ĉeestis la Kongreson. De mia pozicio sur la podio, kie mi sidis inter la reprezentantoj de diversaj landoj, mi rigardis la ĉeestantaron kun miro kaj kreskanta entuziasmo. Sur ĉiu brusto estis arĝentkolora, ŝildforma insigno de la Kongreso, sed strange kaj simbole tiu ŝildforma insigno brilis sub la lumoj de la ĉambrego kiel kvinpinta verda stelo! Dum mi rigardis la aŭdantaron, ideo venis en mian kapon — ideo kiu revenis denove kaj denove dum la daŭro de la Kongreso: “Jen, vere, ni Esperantistoj estas popolo en ni mem. Jen, vere, ni estas forto. Se ni nur povus direkti nian forton laŭ praktikaj celoj, anstataŭ tiom multe revii pri idealismaj, utopiaj celoj, ni povus fari paŝojn notindajn por la mondo.” Mi ne povis eviti tiun penson.

S-ro Georges Warnier, Prezidanto de la Loka Komitato, malfermis tiun unuan kunvenon en sprita, amika, bonhumora sed digna maniero. Kiam mi unue vidis kaj aŭdis sinjoron Warnier — tio estis antaŭ la Kongreso — mi havis la impreson, ke li estis sufiĉe severa, aferema, iom abrupta industriisto; kaj tia li ja estas. Sed, poste mi trovis, ke li havas specialan bonhumoron, lertan kapablon turni frazojn, kaj mirindan kapablon fari aferojn senbrue, kvazaŭ-kaprice sed kompetente.

Post la oficiala malfermo kaj la modestaj vortoj de la Prezidanto de UEA, S-ro Malmgren, diversaj reprezentantoj de la francaj ministroj salutis la Kongreson. Dum la kunveno ankaŭ parolis D-ro Lapenna de Jugoslavio. Mi sidis kaj atente aŭskultis, kaj mi bone memoras kion li diris. Ĉar spite de la fakto, ke li parolis retorike, energie, kaj oni multe aplaudis lin, mi ne povis ne kompari tiujn belajn vortojn kun la faktoj de sia vera reprezentado. Jam tro ofte mi aŭdis la tutsaman retorikon kun belaj vortoj, flanke de la “popolaj demokratioj” en la Unuigitaj Nacioj en Nov-Jorko. Kiel strange sonis la vortoj pri “respekto por fundamentaj rajtoj de la homo”, pri “plena justeco”, kiam ili venis el la buŝo de homo kiu subtenas la komunistan reĝimon de Tito en Jugoslavio—reĝimo kiu plej kruele kaj diktatore pied-

premas la homajn rajtojn de siaj popoloj, kaj malrespektas eĉ la plej fundamentajn principojn pri "homa justeco kaj plena libereco"? Mi ja bedaŭras, do, ke la Esperantistoj ne havas pli da distingopovo por vidi la mallogikecon, la ne-taŭgecon, la nesincerecon de tiu speco de retoriko.

La unua kunsido fermiĝis per laŭvicaj salutoj de reprezentantoj de la naciaj Esperanto-movadoj. Mi havis la honoron prezenti la salutojn de la Esperantistoj de Usono kaj Kanado.

La kongreslaboro dividiĝis en kvar sekciojn por studi kaj priparoli la rolon de Esperanto en la moderna vivo. Tiuj dividoj estis: "Esperanto en la Lernejoj", "Sciencoj kaj Teknikoj", "Internaciaj Intelektaj Interŝanĝoj". "Internacia Trafiko kaj Komercio". Tiu plano de sekcioj estis la bona propono de S-ro Pierre Petit de Francujo, kaj ĝi pruviĝis tre taŭga por la Universalaj Kongresoj. Kian laboron, do, ili faris? Multfoje dum la kongresaj tagoj, ĵurnalistoj demandis min: Kio estas la celo de via Kongreso? Kio estas la decidoj? Kaj mi devas konfesi, ke plejparte mi ne sciis precize kion respondi. Mi ripetadis ion pri "interpopola kompreno", "uzo de Esperanto kiel interlingvo de la mondo", kaj tiel plu. Pri decidoj, mi poste rimarkis, ke ili estis plejparte rekomendoj kiujn la Landaj Asocioj devos plenumi; sed unu konkreta decido ŝajne elvenis de la sekcio pri "Internacia Trafiko". Tiu faris detalajn planojn por starigi turistajn servojn por Esperantistoj. Kial ne? Jen, denove, leviĝas mia vaganta ideo: Esperantistaj klientoj estas ja sufiĉe multnombraj por realigi tiun praktikan servon. Ni, do, organizu nian forton!

La Pariza Kongreso abunde disponis plezurojn kaj distraĵojn. Ekskursoj kun diversnaciaj Esperantistoj, gvidataj de "indiĝenoj", donas multe pli da plezuro kaj informo ol pure turismaj aranĝoj. Ekzemple, kiom multe pli oni povas lerni pri la spirito de Parizo, se la gvidanto mem estas Parizano kiu amas sian urbon kaj povas transdoni al vi iom de la sama sento kaj amo. Mi forte sentis tion, kiam nia amiko,

S-ro Petit, veturigis nin per aŭtomobilo, jen tra mallumaj stratoj, jen tra brilantaj placoj kaj bulvaroj, kaj montris al ni per arda flamo de sento la mirindan belecon de la lumigita katedralo "Notre Dame".

La Kabareda Vespero sub la direkto de la neimitebla Raymond Schwartz estis afero de ĝojiga amuzado. Por vidi tipan Parizan kabaredon, sed en Esperanto-vesto, kaj tiel plene kompreni ĉiujn erojn, ĉiujn vortludojn, estis specialaĵo de la Parizaj aranĝoj.

La tiel nomita "Varietea Vespero" okazis en granda luksa teatro. Ĝi estis tute plena. Estis afero mirinde emocia por vidi kiel facile, kiel nature ĉiu naciانو, ĉiu persono, komprenis la feston. Trupo de Svedaj popoldancistoj montris al ni dancojn de sia lando. S-ro Aberg, la talenta estro, klarigis ĉion Esperante. Denove tiu vaganta, insista ideo frapis je mia menso: Kial ni ne havas pli de tiuj trupoj, el diversaj nacioj, por prezenti antaŭ nia "publiko" kaj ankaŭ al ekstera publiko iun manifestadon de interpopola kaj internacia kulturo. La svedoj montris al ni la vojon. Ni havas la Esperantistojn, ni havas la forton; restas nur la volo organizi ilin en pli praktika aplikado ol nur nebula, idealisma, sentimenta ligo.

La Pariza Kongreso estis la plej granda de post la milito. Ĝi estis por mi memorinda kaj ekscitiga sperto. Plejpare ĝi estis harmonia, ĝuinda — sed sub la eksteraj aranĝoj, mi rimarkis iom tro da influo de certaj elementoj, kiuj povas esti danĝeraj por nia movado, kaj tutcerte ne akordiĝas kun la demokrataj ideoj de la Nord-Amerikaj popoloj. Mi opinias, ke estus bone, se taŭgaj reprezentantoj de Nord-Ameriko ĉeestus kaj partoprenus pli kaj pli en ĉiuj fazoj de la Universalaj Kongresoj kaj la evoluanta internacia Esperanto-movado.

Mi finas ĉi tiun komentarion per persona sperto, por mi plaĉa kaj memoriga: Dum la ferma kunsido de la Kongreso, mi sidis malsupre inter la aŭdantaro. Atente mi estis aŭskultanta la raportojn. Apud mi sidis bonaspekta sinjoro, kaj ni

interŝanĝis kelkajn vortojn. Poste mi rimarkis, ke li skribas ion, kaj tiam li transdonis la papereton al mi. Mi prenis ĝin, kaj legis la jenajn vortojn:

*Ĉarma senditino el Usono,
Kial veni serĉi la Parizan
Modon pri ĉapel- kaj rob-fasono,
Se jam havas vi la ĉarmon Paradizan?*

Sub ĝi troviĝis nomo de iu, sed en tiu momento mi ne rimarkis de kiu. Mi ridetis al la ĝentila sinjoro, kaj tiel finiĝis la afero. Estis nur poste, kiam mi denove legis la "poezion", ke mi komprenis la subskribon. Kaj, jen, ĝi estis la nomo de unu el niaj plej konataj Esperanto-literaturistoj! Ĉu mi diru la nomon? Mi opinias, ke ne! Sed la vortoj restas kiel ĝentila komplimento al mia partopreno en la Pariza Kongreso!

KANADA INFORMO

Nova agado por la aŭtuno komenciĝis en Montreal la 22an de Septembro. S-roj *George Novotny* kaj *Charles MacDonald* aranĝis por ke la grupo kunvenu en la YMCA. D-ro *P. L. Pratley*, pioniro en Montreal, donis konsilan paroladeton. Estis decidite havi novan kurson ĉiuvendrede en la YMCA. S-ro *Novotny* estos la instruanto kaj kondukos la kurson laŭ rekta metodo, por ke kaj france- kaj angle-parolantoj povu partopreni kune.

Studento de Turkujo, S-ro *Y. Gulsoy*, nun troviĝas en Vancouver, B.C. S-ro *Gulsoy* jam fariĝis membro de EANA kaj esprimis deziron aktive partopreni en la amerika movado.

Perdita samideano nun trovita! De post Septembro, ĉiuj sendaĵoj al S-ro *Andrew O'Reilly* revenis, sed en Junio la Centra Oficejo ricevis leteron de li, kun la bona novaĵo, ke li ankoraŭ aktive interesiĝas pri EANA kaj la Esperanto-movado. Dum la somero li deĵoris en la milita rezervorganizo, sed li nun loĝas en Vancouver.

Kuraĝigaj vortoj venis de S-ro *R. P. Christie* en Saskatoon, Sask. Li skribis: 'La 'Amerika Esperantisto' kaj la 'Informilo' estas ambaŭ bonegaj, kaj nia Centra Oficejo nin bone servas.' Sinceran dankon!

LA KVARDEKA EANA-KONGRESO

Jam 40 kongresojn la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko organizis. La 40-a okazis en Portageville, je la limo de la belega Letchworth State Park, de la 7-a ĝis la 10-a de Julio, ne malproksime de Chautauqua, kie la unua EANA-Kongreso kunigis la pionirojn de nia movado en 1908.

Detalan raporton kun bildoj niaj membroj jam ricevis per la speciala somera eldono de AE. Sur la lasta bildpaĝo aperis kelkaj gazetaltranĉaĵoj. La fakto, ke milionoj da usonanoj havis okazon legi pri la kongreso kaj pri Esperanto, indikas, ke la intereso de la gazetaro kaj de la publiko treege pligrandiĝis dum la pasintaj jaroj.

La raportoj de la Prezidanto, Ĝenerala Sekretario, Helpa Sekretariino kaj Kasisto montris, ke la Asocio estas preta por grandaj laboroj. La Esperanto-movado en Usono kaj Kanado nun posedas bone funkciantan Centran Oficejon kaj efikan materialon por propagando kaj instruado.

La kongresanoj admiris la sondiskojn de la "Connor-Kurso" kaj la tute modernan metodon, laŭ kiu ĝi funkcias. Ili aŭdis kun plezuro pri la sukceso de la por-Esperanta broŝureto de la Nacia Eduka Asocio (kiun oni jam imitis en aliaj landoj) kaj pri la laŭdaj vortoj, kun kiuj oni ricevis en multaj partoj de la mondo la libron "Esperanto: The World Interlanguage". Ili vidis kelkajn el la albumoj kun UN-Pet-skriboj, kiujn delegitaro de nia movado prezentis en Lake Success kelkajn semajnojn post la kongreso.

Ĉiam estas granda ĝojo pasigi kelkajn tagojn inter gesamideanoj, speciale se ĉeestas gastoj el aliaj partoj de la mondo. Profesoro Joao B. Mello e Souza el Brazilo kaj lia ĉarma edzino kaj ankaŭ nia agema brazila-vaŝingtona samideano, Afonso Correa, multe helpis la kongreson.

Ne ĉio estis harmonia en Portageville, sed nun, kiam iom da tempo pasis post ĝi, oni povas tamen diri, ke la kongreso estis grava, utila kaj necesa ĉenero en la historio de nia movado.

—*Babi le Mulo*

LETEROJ EN AMERIKO

Usono estas nacio el multaj nacioj, produkto de komuna agado de diversaj tradicioj, rasoj, religioj kaj kulturoj. Pli ol 11 milionoj da usonanoj naskiĝis en aliaj landoj. Preskaŭ 35 milionoj havas gepatrojn naskiĝintajn eksterlande. Tio signifas, ke centoj da milionoj da personoj en la tuta mondo havas parencojn en Usono. Usonanoj ĉiujare skribas pli ol 250 milionojn da leteroj al transmaraj parencoj kaj amikoj en la plej diversaj partoj de la mondo.

Rekte aŭ nerekte tiuj leteroj pentras bildon de Ameriko en la spirito de la ricevantoj. Kelkfoje tiu bildo ne estas ĝusta, ĉar miskomprenoj okazas facile kaj kondiĉoj en Norda Ameriko estas multrilate tute malsamaj de tiuj en Eŭropo kaj Azio. Estas evidente, ke multe da bono povus esti farata, se milionoj da usonanoj farus seriozan klopodon disvastigi la veron pri Ameriko per siaj leteroj.

Tio estas la senco de grava movado, kiu komenciĝis antaŭ kelkaj monatoj sub la nomo "Leteroj el Ameriko". La Komuna Konsilantaro por Amerika Unueco (*Common Council for American Unity*), kiu de pli ol 30 jaroj havas grandan meriton pro laboro kun neanglalingvaj asocioj kaj gazetoj en Usono, iniciatis la movadon. Gazetoj en preskaŭ 30 lingvoj, kun milionoj da legantoj, radio-stacioj kaj asocioj diversspecaj kunhelpas kaj instigas siajn legantojn, aŭskultantojn kaj membrojn al kunlaboro.

Ĉiusemajne la Komuna Konsilantaro dissendas artikoleton en 23 lingvoj kun praktikaj proponoj por leteroj al Eŭropo kaj Azio. En la samaj lingvoj ĝi ankaŭ disvastigas artikolojn de eminentuloj, kiuj subtenas la movadon. Inter la verkintoj troviĝas *S-ino Eleanor Roosevelt, Generalo George C. Marshall, S-ro Robert Patterson*, ktp.

La celo de "Leteroj el Ameriko" ne estas "propagando" en la ordinara senco de la vorto. Estas necese prezenti kaj klarigi faktojn pri Ameriko, kiujn oni ne facile komprenas eksterlande, kaj kontraŭ-batali la mensogan propagandon de tiuj, kiuj malamas Usonon, ĉar ĝi estas demokrata lando kaj donas

materian kaj moralan subtenon al aliaj demokrataj landoj.

La klopodoj de la Komuna Konsilantaro estas tute konkretaj kaj realistaj, ĉar ili estas bazitaj sur detala esploro de la opinioj favoraj kaj malfavoraj pri Usono en multaj eŭropaj landoj. Treege interesa verko pri la rezultoj de tiu esploro, kiun direktis Henry Lee Munson, Vic-Direktoro de la organizo, aperis jam en la jaro 1949 sub la titolo "Eŭropaj Opinioj pri Usono" (*European Beliefs Regarding The United States*). La studo pritraktis la opiniojn pri 45 problemoj koncernantaj Usonon en 21 landoj. Ĝi montras, ke multaj antaŭjuĝoj kaj eraraj opinioj estas produkto de kontraŭ-usona propagando, sed ke aliaj venas de miskompreno kaŭzata per usonanoj mem. Multaj filmoj, ekzemple, pentras bildon de Ameriko, kiu ne korespondas al la vero. Eŭropanoj ne scias, ke la plimulto de la usonanoj neniam renkontas tiujn milionulojn, krimulojn, vakerojn kaj frenezulojn, kiuj okupas tiom da loko en la Hollywood-filmoj.

Esperantistoj multe korespondas kun gesamideanoj en la tuta mondo. Ili sendube povus ludi gravan rolon en la "Krucmilito por la Vero". Skribante al eksterlandanoj, ni ĉiam devus demandi nin: Ĉu mia letero helpas disvastigi la veron pri mia lando? Ĉu ĝi klarigas unu el tiuj faktoj, kiujn oni ofte malbone komprenas eksterlande? Ĉu ĝi povas esti instrumento de pli bona interkompreniĝo, de demokrata progreso kaj de paco? Ĉu ĝi estas defendo de la libereco kontraŭ tiraneco kaj totalitarismo?

Maloftaj Libroj de Literatura Mondo — Malmultekoste

(*Mendu ilin de la Libro-Servo de EANA*)

<i>Tragedio de l'Homo</i> , Madach (Kalocsay), la fama dramo.....	\$1.25
<i>Verkaro de FEZ</i> , verkoj de Felikso, frato de Zamenhof	2.00
<i>Ora Libro de la Esperanto-Movado</i> , bela historia verko	1.40
<i>Sorĉistino el Kastilio</i> , Salom Asch, vere bona novelo.....	1.25
<i>Maria kaj la Grupo</i> , Emba, orig. romano pri Espo-grupo.....	1.25
<i>Tri Homoj en Boato</i> , Jerome (Badash), humora, bonstila	1.80
<i>Mr. Tot Aĉetas Mil Okulojn</i> , Jean Forge, orig. romano	1.65
<i>Johano la Brava</i> , Petofi (Kalocsay), fabelo en versoj85

ESPERANTO - KRONIKO

Nia eminenta brazila samideano Prof. J. Mello e Souza, Prezidanto de Brazila Skolta Ligo, forlasis Usonon kun sia edzino la 7-an de Sept., reirante al Rio per la vaporŝipo "Argentina". Li multe helpis nian movadon, precipe en la EANA-Kongreso en Portageville kaj en la Delegitaro al UNO. Al la Prezidanto de EANA li skribis: "Ĉio multe interesis min kaj certe ankaŭ interesos miajn brazilajn amikojn, kiam mi montros al ili la scenojn de Lake Success kaj de Portageville, kie mi 'magna pars fui', (estis granda parto), kiel diris la latina poeto Virgilio."

Pli ol 300 informpetojn, multajn el ili de eminentuloj, la Centra Oficejo de EANA ricevis rezulte de dupaĝa artikolo pri Esperanto en la grava katolika semajna gazeto AMERICA. La artikolon verkis famkonata pastro, verkisto kaj lingvisto, P. John LaFarge, S. J., iam ĉefredaktoro de AMERICA. Kiel rezulto multaj novaj membroj aliĝis al EANA.

*Ĉiutaga ĵurnalo en Bombay, Hindujo, en Aŭgusto publikigis artikoleon pri Esperanto kaj la Pariza Kongreso; ĝi estis bazita sur intervjuo kun G. Alan Connor, Ĝen. Sekr. de EANA, en la Pariza eldono de *New York Herald Tribune*. Oni vidas, ke la afero estas iom komplikita: Usona Esperantisto pere de intervjuo publikigita en Paris inspiris artikolon en Hindujo.*

Viziton al UNO en Lake Success faris dekduo da Esperantistoj fine de Aŭgusto, okaze de ĉeesto de Ges-roj G.A.F. Loman kaj filino el Örebro, Svedujo. La viziton al Lake Success organizis S-ino Edith Kane kun la helpo de S-ino L. M. Muse kaj D-ro Solzbacher. La UNO-Oficejo por Ne-Registaraj Organizoj tre afable disponigis biletojn al grava kunsido, kiel ĝi ankaŭ faris la 2-an de Aŭgusto por la membroj de la Speciala Esperanto-Delegitaro, kiu prezentis la Pet-skribon.

ESPERANTO - KRONIKO

En Cincinnati, Ohio, malgranda religia bulteno (katolika), "Men of the Holy Eucharist", publikigis anglalingvajn tradukojn de leteroj ricevitaj en Esperanto de slovena (jugoslava) Esperantisto nun en Usono (kaj membro de EANA), *S-ro Peter Golobič*. La tradukojn faris nia fervora membro, *S-ro John H. Schackmann*, en Cincinnati.

Inter multaj laŭdaj leteroj pri la libro *ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE* estas menciinda la juĝo de *Profesoro Adolf Hainschegg*, Docento de Esperanto en la Universitato de Graz, Aŭstrujo, kaj Prezidinto de la pasintjara Aŭstra Esperanto-Kongreso en tiu urbo. Li skribis: "*ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE . . . ŝajnas al mi tute nova tipo de lernolibro: nepre fidinda, naskita el la spirita medio de la moderna vivo, treege riĉenhava, modela laŭ pedagogia vidpunkto, kaj — kion mi neniam trovis krom je Wüster — senerara gvidanto. Kia juvelo ekzemple la ĉapitro, 'The Quest for a Universal Language'! Ekkoni efektivan bezonon kaj ekzakte plenumi ĝin, jen kion mi admire nomas 'amerika genio'!*"

La Prezidanto de grava Esperanto-Klubo en Orienta Eŭropo (pro bone kompreneblaj kialoj ni ne malkaŝas lian nomon) skribis al la Prezidanto de EANA, ke li regule tradukas anglalingvajn artikolojn el *AMERIKA ESPERANTISTO* por uzo en klubaj kunvenoj. *AMERIKA ESPERANTISTO*, li diris, "certe apartenas al la plej belaj kaj riĉenhavaj gazetoj de nia movado."

Artikolojn el AMERIKA ESPERANTISTO lastatempe represis *LA RONDO*, Aŭstralio (Pri Esperanto-Literaturo), *ESPERANTISTA*, Ĉekoslovakujo (Kion Ni Manĝu?), kaj *ESPERO KATOLIKA*, Nederlando (Kion Ni Manĝu? — Jnu Jaro de la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj).

ESPERANTO - KRONIKO

En Aŭgusto, Joseph R. Scherer, Prezidanto de la Los Angeles Esperanto-Klubo, akademiano, antaŭe propagandisto por Esperanto en 48 landoj, sed nun en tre praktika okupo kiel asekura konsilanto, intervjuiĝis ĉe la granda radiostacio KFI en Los Angeles dum la "All Around Town" programo. Dum duona horo li parolis pri la valoro kaj utileco de Esperanto. S-ro Scherer, pli frue en la jaro, parolis en privata hejmo pri "Bali", kaj poste sekvis demandoj pri Esperanto. En ĉiuj tiaj okazoj, S-ro Scherer bone provizas la demandantojn per informo kaj lernolibroj.

UNESCO interesiĝis pri la speciala numero de *Amerika Esperantisto* pri Fakaj Vortaroj eldonita en la somero de 1949. La speciala komisiito de *UNESCO* pri Teknikaj Vortaroj, D-ro J. E. Holstrom, petis D-ron W. Solzbacher, verkinton de la artikolo pri Fakaj Vortaroj, pri diversaj informoj por bibliografio, kiun li nun preparas.

Preston Davis, Jr., Columbus, Ohio, bone konata en gravaj rondoj de nia amerika movado, edziĝis en la somero kaj nun vojaĝas en Eŭropo kun la edzino. Kompreneble ili flugis per aeroplano trans la oceanon, ĉar Preston estas bona piloto mem, kaj hejme posedas sian propran malgrandan aeroplanon. Ni kore gratulas la feliĉan paron kaj deziras por ili bonvojaĝon.

Noto pri vere praktika gramatiko: Ni deziras altiri atenton de niaj membroj al la *Practical Grammar* de Ivy Kellerman Reed. Ĝi estas nun havebla je tre malmultekosta prezo (nur 35c) ĉar la presado per "ofseta metodo" ne estas centprocente bona. Tamen ĉio de la enhavo estas bone uzebla, kaj por tiuj kiuj ne necesas havi la plej belan presadon, estas havebla la plej bona malgranda lernolibro je plej malalta kosto. Mendu la librojn de EANA por kursoj kaj amikoj.

ESPERANTO - KRONIKO

Alice Vanderbilt Morris, grava estrino en laboroj por solvi la problemon de internacia lingvo, mortis 15 aŭgusto 1950. Ŝi estis la famkonata ĉefulo de *IALA*. Ŝi havis sian propran ideon pri maniero por sukcesigi la solvon de la interlingva problemo, nome per kunigo de ĉiuj projektoj en unu kunfandiĝon. Ŝi ofte malakordiĝis kun la Esperantomovado, sed tamen ŝi faris multajn helpojn al Esperanto en malavara maniero. Ŝi finance subtenis diversajn Esperantolibrojn, ekz: *Verkaro de Zamenhof*, *Bibliografio de la Internacia Lingvo*, k. a. Je la tempo de sia morto, S-ino Morris estris planon por eldoni novan, ampleksan vortaron de internaciaj vortoj. Bedaŭrinde ŝi ne vivas por vidi la presadon de tiu impona verko, kiu ja eldoniĝos antaŭ la nova jaro. Forpasis bela kaj aminda persono, kaj al la posteuloj ni esprimas nian kondolencon.

Belaj, modernaj Kristnask-kartoj, en Esperanto, estas nun haveblaj de EANA. Presita sur bona papero estas gaja Sankta Klaŭso en la formo de ŝvebanta verda stelo. Sur rubando estas la gaja esprimo "Saluton". La Esperanto-teksto estas en bronz-blua koloro kun malgranda verda stelo. La randoj de la karto kaj la koverto estas en tre arta, verda stilo. Jen oportuno por saluti la amikojn en trafa maniero *en Esperanto*. Mendu ilin en kvanto tuj, kaj celebru Kristnaskon Esperante! Prezoj: 12 por \$1.75; 24 por nur \$3.00; unu ekzemplero por 20c. Ĉiuj afrankite de EANA.

Gravaj helpantoj en EANA, estas tiuj kiuj daŭre dum longa tempo kontribuas al la *Subtena Kaso*. La Esperantomovado ŝuldas grandegan dankon al ili, ĉar tiuj helpoj ebligas laboron por Esperanto en Ameriko. Kolegoj jene: *Dr. Luella Beecher, J. F. Clewe, E. G. Dodge, Dr. G. Ferree, J. H. Furay, Thos. Goldman, Geo. Hirsch, Tony Nabby, R. C. Palmer, A. Pennekamp, Mazah Schulz, H. S. Sloan, F. H. Sumner, Mrs. E. D. Wainman, Flora Wyman.*

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

Argentino. S-ro Ruben L. Guidotti, Caseros No. 123, *Caseros (B. Aires)*. Interŝ. PM kun la tuta mondo kaj belajn PK.

Argentino. F-ino Amelia Reichmann, Murature 4765-Suc. 7, *Buenos Aires*. Dez. kor. kun junaj gesamideanoj en Usono.

Belgujo. S-ro V. Lamberts, 62 Renan Ave., *Brussels* 3. Dez. interŝ. PK (ilustrantaj lokajn antikvajn aŭ modernajn konstruaĵojn, panoramojn) filatele kaj bildflanke afrankitaj, esper. gazetoj kaj faldfolioj.

Finlando. V. Eronen, *Kerkkoo*. Informoj pri "novaj nomoj"! Originalaj kaj universalaj por ĉio kaj ĉiu. En Esperantujo ĉiam brilas la suno. Toleru trikot-novaĵon pri radio "oĵo" kostumo.

Francujo. F-ino Violette Rigaud, 157 rue Dr. Temporal, *St. Rambert-en-Bugey (Ain)*. 20-j. dez. kor., interŝ. PM.

Japanujo. Esperanto-Grupo de Hyogo Sanatorio, Miwa, *Sanda (Hyogo-ken)*. 15 klubanoj dez. kor.

Japanujo. S-ro Ritsunari Tokai, c/o Kudo, 26 Sizimikai, *Aomori-si*. 18-j. dez. kor., interŝ. PM, PK, Esp-aĵojn.

Japanujo. S-ro Yuzo Kasai, 102 Shijimikai-machi, *Aomori-shi*. 18-j dez. kor., interŝ. PM, PK, Esperantaĵojn.

Usono. S-ro Kim Braithwaite, 868 2nd Ave., *Salt Lake City Utah*. Dez. kor. kun iu kiu parolas la lingvon "georgian" aŭ havas librojn en tiu lingvo.

Bulgarujo. Esperanto-Grupo, *Berievo Sevlievsko*. Dez. kor.

Usono. S-ino Louise Ziegler, 239 Ridgefield Road, *Memphis, Tennessee*. Dez. kor.

Usono. F-ino Parvin Oglesby, 47 Danube St., *Dorchester 25, Mass.* Dez. kor.

Brazilo. S-ro Julio Vidal, Rua Sao Januario 199 (Fonseca), *Niteroi, E. Rio*. Dez. kor. kaj interŝ. il. PK kun Usonanoj.

BOOKS FOR YOUR WINTER READING

(Sent postpaid from the Book Service of EANA)

La Ĝoja Podio

By *Raymond Schwartz*. A treasure chest of humor with that Latin Quarter flavor for which Schwartz is famous. About 85 stories, poems, sketches, and "lectures," all of them short, easy to read, and highly entertaining. See review in Mar.-Apr. AE. 271 pp.Paper-bound \$1.00, Cloth \$1.40

Invito al Ĉielo

By *James D. Sayers*. An original novel. Acclaimed throughout the world because of its fantastic subject matter (a trip to Mars), its fluent style, and its provocative (and in part highly controversial) religious ideas. 205 pp.Half-cloth \$2.15

Bulgara Antologio

Compiled by *Ivan H. Krestanov*. Published in Sofia in 1925, this book is now very hard to find. It presents in excellent Esperanto translations the selected prose and poetry of 40 Bulgarian authors, from Petko Slavejkov to Anna Karima. A book for literary connoisseurs! The style is easy and of the highest quality. 248 pp.Paper bound \$2.50

Morto de Trajno

By *Freeman Wills Crofts*, translated by *Mason Stuttard*. A famous English mystery story. 256 pp.Cloth bound \$1.50

La Naiveco de Pastro Brown

By *G. K. Chesterton*, translated by *Cecil Bean*. Twelve of Chesterton's famous "Father Brown" mystery stories, including "The Strange Feet," "The Sins of Prince Saradine," "The Honor of Israel Gow," and the "Invisible Man," full of suspense, action, horror, charm, and philosophy, in a very fluent Esperanto translation. 256 pp.Cloth-bound \$1.50

ABC-Libro

Verse by *Nenjo Rimanto*, pictures by *Brian Leslie*. An entirely new picture book for small children. Printed on strong cardboard, 12 pp. plus cover\$0.25

Brulanta Sekreto

By *Stefan Zweig*, translated by *K. R. & P. E. Schwerin*. Four short stories by the famous Austrian writer, plus the farewell letter which he wrote before his tragic death in Brazil. 158 pp. Latest of the "Epoko" booksPaper-bound \$0.70

Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity.

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. Brief course of 64 pages25c
REED'S PRACTICAL GRAMMAR, Dr. Ivy Kellerman-Reed. Very complete beginner's text for self or classes, giving extensive examples, dialogue, etc. Offset reprint, with some pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with index. Original price 75c, reduced to less than half-price35c
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 entertaining illustrations for rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto with pictures. 160 pp.30c
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "Six-books-in-one": history, textbook, reader, world directory, and two dictionaries. All in one volume. 245 pp.Paper \$1.50; Cloth	\$3.00
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, Dr. Benson. A rare wonder-book with 11,000 pictures, all-Esperanto, 560 pp.Cloth	\$6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, Cox. A detailed analysis of Esperanto grammar, with examples. 371 pp.Cloth	\$1.50
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Mario A. Pei. A guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> . 663 pp.Cloth	\$6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's little pocket companion. Offset ed. 80 pp.25c
EDINBURGH DICTIONARY. Esp-Eng & Eng-Esp. Complete, in concise form. The very best small dictionary. 288 pp.....Cloth	.85c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj al la Universala Vortaro de la Lingva Komitato". 490 pp.Cloth	\$2.60
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Latest edition including appendices of proper names and neologisms. Each meaning listed individually. 348 pp.Cloth	\$2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, Zamenhof and others. Model chrestomathy and literary guide. 472 pp.Paper bound	1.50
Rare ed., ptd 1924, royal blue cloth with gold	Cloth bound 2.50
KARLO, Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo from boyhood to marriage. 43 pp.25c
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio). The best "Reader". Bound in blue, art vellum, 8vo, 996 pp.Cloth	\$2.00
ESPERANTO SORTIMENTO. Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, <i>Thais</i> , by Anatole France, (2-in-1) 66pp; <i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , miracle of love, 48 pp. Each book 25c. Entire sortimento for only	\$1.00
INDIAN BEAD STARS. White ground, green star in center85c
GREEN STARS. White ground, gold trim, brooch or button50c

Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. And it's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. *All* designed so you can *master* Esperanto.



- The complete "*Connor Course*" includes the following:
- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
 - (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
 - (3) A practical and easy-to-follow '*Study Guide*' (82 pp.)
 - (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
 - (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
 - (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
 - (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*," as described above, will be sent postpaid for only \$36. **FOR GROUP STUDY:** Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide. Delivered with a full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

Doris Tappan Connor, 114 W. 16 St, New York, N.Y.